Prezo: 7 €
www.satesperanto.org
Majo-Junio 2019 | n-ro 05-06 (1367-1368)

# Sennaciulo

Oficiala organo de Sennacieca Asocio Tutmonda




SAT-anoj kutimiĝu al eksternacia sent-, pens- kaj agadkapablo!

# Ondo malvarma

ventego malaltigas la temperaturon.
imagante sin favorato,
la rigida fingro enlite volas vian silenton sonigi
per unu aŭ du klakoj.
trueto aperas en plafono;
tra ĝi G maĵora de la oldaj geedzoj supre
falas kiel senlimaj folioj fajfe.
tuj mi ŝtopas la orelojn per miniorelaŭdilo
kaj aprezas la sortan simfonion* de Betoveno surda.
fingraj premsignoj estas kovritaj de neĝego;
viaj vortoj kvazaŭ la vasta rivero blua ne deĉifreblas.
legi hieroglifaĵojn seksohavajn fariĝas manio.

Mao Zifu (2018/12/06)

* Krom-nomo de la kvina simfonio de Betoveno, tiam "nur" 60% surda.(NdR)



## ✍ REDAKTANGULO ✍

Karaj legantoj,

Jen la majo-junia numero de via gazeto Sennaciulo, kiu entenas, aldone al la kutimaj rubrikoj, la diversajn raportojn diskutotajn dum la kongreso. Se vi ne estas inter la aliĝintoj, ankoraŭ estas tempo decidiĝi. Kaj se vi ne povos veni, skribaj kontribuoj al la komuna pripensado estas ĉiam bonvenaj. Ankaŭ por tio utilas Sennaciulo. Kaj ne forgesu, ke la plej simpla maniero partopreni en bonorda asocia funkciado estas... akurata kotizpago (vidu la ĉi-suban alvokon de nia kasisto).

Finfine aperis solvo por kongresurbo en 2020, kaj eĉ jam por la postaj jaroj kelkaj kuraĝuloj elpaŝis kun proponoj. Intertempe, ne mankas aliaj farendaj taskoj. Ekzemple, kun la septembro-oktobra numero de Sennaciulo devus normale aperi la jara suplemento Sennacieca Revuo. Sed momente tute mankas materialo por ĝi. Do, ek al viaj klavaroj kaj fotiloj !

Agrablan kaj partopren-instigan legadon deziras al vi

La redaktoskipo

**Frontpaĝa bildo**

Saioa, organizanto de nia venonta kongreso, antaŭ la pordo de la kunlaboranta Liberecana Ateneo de la barcelona kvartalo Gràcia

### Alvoko al rekotizo

**ANKORAŬ MULTAJ MEMBROJ NE REKOTIZIS EN 2019!**

Situacio je la 01/06/2019:
- 233 kamaradoj pagis 2019
- 213 kamaradoj pagis 2018

Bonvolu pagi akurate vian kotizon. Tio faciligas la laboron de la SAT-administracio pro ŝparo de energio kaj monon utiligataj por sendo de multaj revokleteroj al la malfruantoj. Energion kaj monon ni pli bone uzu por SAT-agado!

Pripensu starigi aŭtomatajn ĝirojn al nia konto.

Tamen, se kamarado havas malfacilaĵojn por pagi, tutsimple li aŭ ŝi petu ke ni uzu la solidarkason.

Amike:

BRUNO (KASISTO)

# Enhavo


**NACIISMO KAJ KOSMOPOLITISMO**
4 La demokratio de la ĥaoso
5 Esperanto en simbola funkcio
6 Laŭdo al la kosmopolitismo

**TRA LA MONDO - MEZORIENTO**
6 Nigraj nuboj super Roĵavo
8 La rifuĝejo sub minaco
9 Alvoko ne forgesi Kurdion

**TRA LA MONDO - EŬROPO**
10 Sociaj tavoloj kaj maldekstro
12 La poeto ĉiam pravas
13 La plifortikiĝanta “vokso”
14 “La malpermeso uzi la rusan lingvon dum instruado en privataj altlernejoj estas la sekvanta parto de la degradado”

**SINDIKATISMO TUTMONDA**
15 Ĉinio: liberigu la enkarcerigitajn aktivulojn pri laborrajto, kiuj uzadas sian liberecon pri asociiĝo
15 Jordanio: la reĝo devas forpuŝi la malĝustan laborleĝon adoptitan de la Parlamento

**EKOLOGIO KAJ MEDIPROTEKTADO**
16 Stagnanta japana nuklea politiko
18 La homaro danĝere plivarmigas la Teron

**INTELEKTA MEMDEFENDO**
21 Ne komparu
22 Vero kaj malvero

**BELETRO**
2 Ondo malvarma
24 Usonen!

**SAT-ANOJ AKTIVAS**
25 Raporteto pri la aprila kunsido de SATeK 2019
25 Raporteto pri la unua kunsido de SATeK 2019

**TRA ESPERANTIO**
26 La 4-a LUMINESK’ en Königswinter

**EL LA SAT-ADMINISTREJO**
28 Bilanco 2018
29 Spezkonto 2018
30 Agadraporto de la Plenum-Komitato por la periodo de Junio 2018 ĝis Majo 2019
31 Raporto de la Ĝenerala Konsilantaro 2018-2019
32 Bilanco de la kongreso en Kragujevac 2018
35 Landaj Perantoj | Kotizoj

**90A SAT-KONGRESO**
33 Du ekspozicioj videblos en Barcelono
34 Aliĝintoj


*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn ni ne resendas. Kontribuojn sendu al:*
***sennaciulo.redaktejo@gmail.com***